

# 7

## *En La Tendaro De La Komanĉoj*

**K**iel ni la arbaro irumis malsupren laŭ la monto, kaj akompanumis nin kelkan distancon sur la prerion laŭ la rivero. Ĉe rivereto, kiu fluis en la Pecos:on, ni retrovis la spurojn de la komanĉoj. Ili certe estis faritaj hieraŭ tagmeze, kaj tute ne malproksime de tio la ruĝuloj estis restintaj, ŝajne pro pasigi la plej egan tagvarmegon.

Ankaŭ mi decidis ripozi iomete tie ĉi, sed elektis lokon, kiu ne estis tiel proksime al la rivero, sed iomete pli ree en la arbedaro, kaj tiel estis plie kovrita al envido. Tiu gardiĝa rimedo baldaŭ praviĝis, ĉar mi apenaŭ estis sidiĝinta kun Ma-ram, kiam Cäsar, kiu volis bani kun sia ĉevalo en la rivero, revenis kaj vokis:

„*Massa*, ho, ho, kavalkanti venas — un, du, kin, sis kavalkanti. Ka fugar, *massa*, o batar morte kavalkanti?“

Mi antaŭensaltis al la rando de la arbedaro kaj fakte ekrimarkis ses ĉevalojn, kiuj kuris rapide al ni en du grupoj da po tri, de malproksime kontraŭflue. La lastaj du en ĉiu grupo ŝajne portis pakojn, dum sur la antaŭaj sidis po unu rajdanto. Do estis nur du malamikoj, se ili vere estis malamikoj, ĉar mi vidis malgraŭ la distanco, ke ne estis indianoj, sed blankuloj.

Sed malantaŭ ili rajdegis kvin figuroj, kiuj ne povis esti io alia sed *indsman*:oj, kaj kiuj certe devis atingi la fuĝantojn post maksimume kvin minutoj. Do tio nur povis esti persekutado, kaj pro ekkoni, kiel mi devis agi, mi enmanigis mian teleskopon.

„*Zounds!*“ mi elpuŝis nevolite, ĉar la antaŭa rajdanto estis Fred Morgan, kaj la alia lia filo Patrick.

Mi decidis kapti ilin vivante, pafpretiĝis kaj atendis. Ili venis malsupren proksime laŭ la rivero, la indianoj ne pli ol kvincent paŝojn malantaŭ ili. Mi jam aŭdis la spiregon de

la ĉevaloj. Nun ili estis alvenintaj kaj volis preterrajdi. Mi lanĉis du fojojn. Mi zorge estis celinta al la kapoj de la du rajdobestoj. Ili kolapsis. La ŝargobestoj estis ligitaj al ili kaj provis, ektimigite per la pafoj, deŝiriĝi. La rajdintoj estis ĵetitaj for sur la teron. Mi ĵus volis salti al ili.

„O—*hi—hi—hiiii!*“ eksonis la batakriado de la alhastantaj ruĝuloj, kiun ankaŭ Ma-ram komencis krii, kaj jam mi estis ĉirkaŭata. Tri tomahokoj kaj du tranĉiloj brilis super mia kapo.

„*Ĉa!*“ Ma-ram vokis, defende etendante la manon. „Tiu palvizaĝo estas la amiko de Ma-ram!“

Ili ĉesis ataki min, sed la konsekvenco de ilia atako ne plu estis ŝanĝebla: la du elseligitaj estis havintaj la tempon ekstariĝi kaj fuĝi en la arbedarojn, kaj la ĉevaloj, krude stariĝinte sur la malantaŭajn kruojn, deŝiriĝis kaj estis kurintaj en la akvon. Mi estis rekoninta, ke ili estis niaj kvar ŝargobestoj. Ili estis peze ŝarĝitaj, kaj tial tuj dronintaj post la enakviĝo.

Kvar el la indianoj ekhastis malantaŭ la fuĝantoj. La kvinan mi retenis.

„Mia ruĝa frato diru al mi, kial la militistoj de la komanĉoj persekutas iliajn blankajn amikojn!“

„La blankaj viroj estas kiel la serpentoj. Iliaj langoj havas du pintojn. Dum la nokto ili mortigis la gardiston kaj forfuĝis kun iliaj trezoroj.“

„Kun la oro, ĉu?“

„Ili prenis la metalon kaj la multajn medicinfoliojn, kiuj estis en la felo.“

Li lasis nin stari kaj hastis post siaj kamaradoj. La du Morgan:oj do estis timintaj, ke la komanĉoj fortenu ilin de iliaj trezoroj, kaj kaŝe estis foririntaj. Per la ‚medicinfolioj‘ oni devis kompreni la deponaj kaj bankaj biletoj, kiujn ni estis volontaj forpreni de ili. Ĵus tie, kie la ĉevaloj estis kurintaj en la akvon, la rivero havis kurbon, tiel ke tieis kirluĝo, kiu senesperigis nin iam reelricevi la de la fluego devoritajn aĵojn. *Deadly dust*, mortiga polvo!

Kio nun farendis? Sed la zorgo pri la amikoj estis pli granda ol la deziro kapti la du malamikojn. Cetere la Morgan:oj ja estis persekutataj de la kvin komanĉoj. Ni trankvile povis lasi la sekvadon al ili.

„Kial mia blanka frato pafas al la ĉevalo, kaj ne al la rajdanto?“ Ma-ram demandis min. „Ĉu Old Shatterhand ne lernis celi?“

„Kial Old Shatterhand ne mortigis Ma-ram:on la komanĉon, super kies koro jam estis la tranĉilo? Li mortigis la ĉevalojn, ĉar li volis paroli kun la rajdantoj.“

„Li parolos kun ili, ĉar li sekvos ilin kun siaj ruĝaj fratoj!“

Mi preskaŭ devis rideti pri la fervoro de la indiano retenadi min de la sekvado de la spuro de miaj kaptitaj amikoj.

„Li ne sekvos ilin. La militistoj de la komanĉoj estas saĝaj kaj bravaj. Ili kaptos la malicajn palvizaĝojn kaj porti ilin en iliajn *wigwam*:ojn. Ma-ram iĝu sur sian ĉevalon kaj sekvu min!“

La okaziĝo estis forpreninta ĉiun emon de mi restadi, kaj aliĝis rimarkon, kiu urĝiĝis al mi: Niaj amikoj estis kondukataj de dek tri rajdantoj. La du Morgan:oj, kvin koman-

ĉoj kaj la mortigita gardisto nun devis esti minusataj, kaj tiel rezultis, ke ili estis gardataj nun plu nur de kvin indianoj. Sub tiuj kondiĉoj estis pli facile liberigi ilin.

Do mi lasis la ĉevalojn kuri pli rapide ol antaŭe. Ĝis la vespera krepusko ni estis pasintaj tian eminentan distancon, ke mi, kiam mi zorge ekzamenis la spuron, konvinkiĝis, ke la magranda trupo estis estinta tie nur je la tagmezo. La fuĝo de la Morgan:oj, la mortigo de la gardisto kaj la supozo, ke ili ne estis sekvataj malrapidigis ilian haston.

Kvankam Ma-ram serĉe ĉirkaŭvidis pro trovi restejon, li devis sekvi min ankoraŭ preskaŭ kvar anglajn mejlojn plu, ĝis malheliĝis tiel, ke simple estis neeble ankoraŭ vidi la spuron. Nur tiam mi ordonis halti. Apenaŭ, ke la mateno krepuskis, oni reekiris.

Nun la spuro kondukis for de la rivero sur la savanon, ĉiam suden. Tie kaj tie ni trovis bubalajn vojojn, sur kiuj ni antaŭeniĝis, kaj dum tio mi rimarkis, kiam mi foje ekzamenis la spuron, ke ni ĉiam pli proksimiĝis al la sekvatoj. Mi jam havis la esperon atingi ilin je la tagmezo, kiam unu sola momento malesperigis min. Fakte ni venis al loko, kiu havis amason da hufaj premsignoj, kaj de tie kondukis almenaŭ kvardek ĉevalaj spuroj suden.

„Uŭ!“ Ma-ram vokis.

Li ne diris ion plu, sed lia okulo brilis per plezuro, dum lia mieno restis senmove. Kaj mi komprenis lin sufiĉe bone. La gardistoj de niaj kunuloj estis trovintaj komanĉan trupon, sub kies sekuro ili hastis al la kuna tendvilaĝo.

„Kiel longe ni rajdu plu al la restejo de la komanĉoj?“ mi demandis la indianon.

„La rakuroj ne havas restejon. Ili starigis vilaĝon en la savanon, kiu estas pli granda ol la urboj de la palvizaĝoj“ li deklaris. „Kiam mia blanka ĉevalo rajdas rapide, li atingos ĝin antaŭ la suno malaperos malantaŭ la herbejo.“

Je la tagmezo ni mallonge haltis, kaj fakte je la vespero aperis pluraj malhelaj strekoj sur la horizonto, kiun mi ekkonis per la helpo de la teleskopo esti longaj tendvicoj.

La komanĉoj tutcerte pro la proksima bubalĉasejo starigis tian eminentan loĝejon tie ĉi, kaj ili ŝajnis esti ege okupitaj pri la alveno de la kaptitoj, ĉar ni povis proksimiĝi longan vojon al la restejo, sen renkonti indianon.

Mi haltigis mian ĉevalon.

„Ĉu tie estas la *wigwam*:oj de la komanĉoj?“ mi demandis.

„Ili estas“, Ma-ram asertis.

„Ĉu To-kaj-ĉun, la granda ĉefo tieos?“

„La patro de Ma-ram ĉiam estas ĉe siaj militistoj.“

„Ĉu mia ruĝa frato volas rajdi tien kaj diri al li, ke Old Shatterhand venas pro viziti lin?“

Li vidis al mi sufiĉe surprizigite.

„Ĉu Old Shatterhand ne timas antaŭ tiel multaj malamikoj? Li mortigas la bubalon kaj la grizan urson, sed li ne povas mortigi la komanĉojn, kiuj estas multenombraj kiel la arboj de la arbaroj.“

„Old Shatterhand ne volas mortigi siajn ruĝajn fratojn. Li ne timas antaŭ la Suoj, la Kajovajoj, la apaĉoj kaj la komanĉoj, ĉar li estas la amiko de ĉiuj bravaj militistoj, kaj li donas sian kuglon nur al la maliculo kaj la perfidisto. Li atendas tie ĉi. Mia frato iru!“

„Sed Ma-ram estas lia kaptito. Kio, se Old Shatterhand perdas lin?“

„Ma-ram nun ne plu estas mia kaptito. Li drinkis la fumon de la pacon kun mi; li liberas!“

„Uf!“

Post tiu vorto li sentigis la spronojn al sia ĉevalo kaj galope forrajdis. Mi deĉevaliĝis kun Cäsar. Ni sidiĝis kaj lasis la ĉevalojn paŝtiĝi. La bona nigro faris ege dubantan mienon.

„Massa, kvo facos *indian* a povra Cäsar, kande *massa* kunprenas Cäsar ad *indian*?“

„Tion ni atendu!“

„Vartar es maligna, malica, mala kozo. Ka Cäsar vartu til *indian* fritas Cäsar sur fosto?“

„Eble ne okazigös tiel malbone kiel vi pensas. Ni devas iri al la komanĉoj, kiam ni volas savi vian *massa*:n Bernard!“

„Ho, ha, jes, Cäsar salvos bona *massa* Bern'. Lasos su fritar e boliar e manĵar, kande nur *indian* lasos libere *massa* Bern’!“

La nigrulo akompanigis tiun heroecan decidon per rikano, kiu certe estus taŭginta neigi ĉiun emon de la indiano manĝi lin, kaj tiam li prenis pecon da sekigita viando, pro almenaŭ ĝui iujn de la plezuroj de la vivo antaŭ lia tortura morto.

Ni ne longe devis atendi la sukceson de nia anonco. Post kelka tempo venis sufiĉe granda trupo al ni, kiu disiĝis, formis vastan cirklon, tiel ke ni estis ĉirkaŭitaj, kaj ili subite malvastigis tiun cirklon galopante kaj kriante kaj armilsvingante, ke ŝajnis, kvazaŭ ili volis rajdi nin teren. Grupo de kvar ĉefoj vere rajdis rekte al ni plengalope, kaj saltis trans ni. Cäsar falis malantaŭen sur la teron, sed mi trankvile restis sidinta, kaj eĉ ne harvastece movis la kapon dekstren aŭ maldeskstren.

„Ho, ha, *indian* kavalkas morte Cäsar e *massa*!“ la negro kriis, gardiĝe levante la kapon pro informiĝi pri la aktuala stato de la okazoj.

„Ne ekideos al ili!“ mi instruis lin. „Ili nur volas ekzameni nin, ĉu ni havas kuraĝon.“

„Ekzameni? Ho, *indian* nur venu; Cäsar havas kuraĝo, tre tute multa kuraĝo!“

Li residiĝis rekte kun sia plej teruriga mieno, fakte ĵus je la ĝusta tempo, ĉar la ĉefoj estis deĉevaliĝintaj kaj venis al ni. La plej maljuna komencis paroli:

„Kial la blanka viro ne stariĝas, kiam la ĉefoj de la komanĉoj paŝas al li?“

„Li volas montri al ili per tio, ke li benvenas ilin“, mi respondis. „Miaj ruĝaj fratoj sidiĝu je mia flanko!“

„La ĉefoj de la komanĉoj sidiĝas nur al la flanko de ĉefo. Kie la blanka viro havas siajn *wigwam*:ojn kaj siajn militistojn?“

Mi prenis la *bowie*-tranĉilon en la dekstran manon.

„Ĉefo devas esti forte kaj brave. Kiam la ruĝaj viroj ne kredas, ke mi estas ĉefo, ili batalu kun mi. Tiam ili ekkonos, ĉu mi diras la veron.“

„Kiu estas la nomo de la palvizaĝo?“

„La ruĝaj kaj blankaj militistoj kaj ĉasistoj nomas min Old Shatterhand.“

„Tiun nomon la blanka viro certe donis al si mem!“

„Kiam la ĉefoj de la apaĉoj volas batali kun mi, ili rajtas uzi la *tomahawk*:on kaj la tranĉilon. Sed mi uzos nur mian manon. *Hough*!“

„La blanka viro parolas fierajn vorton. Li ja montros, ĉu li eble nur fanfaronas. Li iĝu sur sian ĉevalon kaj venu kun la militistoj de la rakuroj!“

„Ĉu la komanĉoj fumos la kalumeton kun mi?“

„Ili interkonsilos, ĉu ili rajtas.“

„Ili rajtas, ĉar mi venis kun paca intenco al ili.“

Mi surĉevaliĝis, kaj ankaŭ Cäsar grimpis sur sian obstineman ĉevalon. Ŝajne oni tute ne atentigis pri li. La indiano estas eĉ pli fieruma pri la nigra raso ol la blankulo. Sed mi estis meziginta inter la ĉefoj, kaj ni ekrajdis per rapidega galopo al la vilaĝo, tiam en ĝin kaj laŭ la resteja strateto, ĝis ni atingis grandan tendon, antaŭ kiu ili haltis kaj desaltis. Mi faris la samon.

Cäsar ne estis videble. Mi estis ĉirkaŭata de ĉiuj militistoj, kiuj estis venigintaj min. La ĉefo, kiu jam antaŭe parolis al mi, ekprenis miajn pafilojn.

„La palvizaĝo donu siajn armilojn al ni!“

„Mi tenas miajn armilojn, ĉar mi venis al vi libervole, kaj ne estas via kaptito.“

„La blanka viro tamen donos siajn armilojn al ni, ĝis la ruĝaj viroj scias, kial li venis al ili.“

„Ĉu la ruĝaj viroj timas antaŭ mi? Kiu postulas, ke mi fordonu miajn armilojn, timas antaŭ mi.“

La ĉefo sentis sin atakita je sia militista digno, kaj faris demandan vidon al la aliaj. Ŝajne li vidis trankviligan respondon en iliaj okuloj, ĉar li diris:

„La militistoj de la komanĉoj ne scias, kio estas timo kaj malkuraĝo. La blanka viro tenu siajn armilojn.“

„Kiun nomon havas mia ruĝa frato?“ mi nun scivolis.

„Old Shatterhand parolas al To-kaj-ĉun, antaŭ kiu timtremas la malamikoj.“

„Mi petas al mia frato To-kaj-ĉun doni tendon al mi, en kiu mi povas atendi, ĝis la ĉefoj de la komanĉoj parolos kun mi!“

„Viaj vortoj bonas. La palvizaĝo ricevu tendon, ĝis la militistoj de la rakuroj fininterkonsilis, ĉu ili povas fumi la kalumeton kun li.“

To-kaj-ĉun faris postulan mansignon kaj paŝis antaŭen. Mi prenis la kondukilon de mia mustango kaj sekvis lin. La indianoj formis strateton, laŭ kiu ni iris, kaj dum tio mi rimarkis kelkan maljunan kaj junan virinan vizaĝon, kiu kaŝe videtis el tiu aŭ alia tendo pro rigardi la blankulon kiu aŭdacis iri meze en la kaĝon de la leono. Feliĉe tiu tribo de la komanĉoj ne estis tiu, kun kiu Winnetou antaŭe estis interbatalinta en la Mapimi.

La tendoj aŭ dometoj estis mastrumataj tute en la maniero, en kian mi ankaŭ estis vidinta ilin ĉe la nordaj indianoj. La laboro estas farata nur de la virinoj, ĉar la indiana viro ja ne konas alian okupiĝon krom milito, ĉasado kaj fiŝkaptado, kaj lasas ĉian alian penon al la sekso, kiu ĉe ni estas kutime nomata la malforta.

La virinoj alportas la felojn, kiuj estu la tendaj kaj dometaj muroj, vastigas ilin en la suno kaj desegnas la formon sur ĝin per peco da karbo. Tiam ili eltranĉas tiun formon kaj kunkrudas tiujn formojn per maldikaj rimenoj. Nun la palisetoj estas alportataj, kaj oni transportas ĉion al la loko, kiu estis elektita por la loĝejo. Tie ĉi fajrotroo estas kavigata per la plej simplaj iloj, ĉirkaŭ duonan metron profunde, ĉirkaŭ kiu oni starigas en rilataj

distancoj pli aŭ malpli palisetojn, laŭ la intencita grandeco de la loĝejo. Ili supre estas alklinigataj kune, kaj interligataj per junaj salikoj aŭ avelujeroj. Tiu laboro ne facilas, ĉar la virinoj kaj knabinoj devas suprengrimpi laŭ la palisetoj, kaj povas fiksteniĝi dum la interligado nur per la piedoj. Kiam la skafaldo estas farita tiamaniere, komencas la plej malfacila parto de la konstruado, fakte la kovrado de la tenda skafaldo per la pezaj feloj. La palisetoj de tiu skafaldo estas fortikataj duonalte per vertikalaj stangoj, kiuj supre havas forkon, kaj estas alligitaj per rimenoj al la ĉefaj palisetoj. Tiamaniere estas kreata dua cirklo en la unua, per kiu la tuta spaco estas apartigata al du sekcioj. La ekstera palisa cirklo nun estas kovrata tegolece per feloj, tiel, ke supre restas truo, pro lasi eliron al la fumo de la fajro en la mezo de la tendo. La du cirklerondaj apartaĵoj tiam povas esti partigataj per feloj aŭ plektaĵoj al laŭplaĉaj subapartaĵoj, tute laŭ la deziro de la posedanto.

La tendo, al kiu mi estis kondukata, estis nur malgranda, kaj momente neloĝata. Mi alligis mian ĉevalon ekstere, malfermis la enirajn kovrotukojn kaj enpaŝis, sen iom plu atentigi pri la ĉefo, kiu ja ankaŭ ne sekvis min.

Mi ankoraŭ ne troviĝis du minutojn en la interno de la ĉambreto, kiam aperis pramaljuna indianino, kiu faligis dikan kunligiĝon da sekaj branĉoj de sia ŝultro sur la teron. Ŝi remalaperis, kaj post kelka tempo revenis kun granda argila pota, en kiu ŝajne estas akvo kaj io alia. Nun ŝi bruligis fajron, kaj metis la poton meze en la ardon.

Mi estis elstreĉiĝinta sur la tero kaj silente rigardis ŝin, ĉar mi sciis, ke laŭ indiana kompreno mi estus perdinta iom da mia digno, se estus ekideinta al mi komenci interparolon kun ŝi. Ankaŭ mi povis facile pensi, ke mi tie ĉi estis certe rigardata, kaj ke, nerimarkite de mi, verŝajne diversaj okuloj tra iaj truoj aŭ fendetoj vidis al mi.

La akvo en la pota komencis boli, kaj nun la odoro malkaŝis al mi, ke mi ricevu bubalviandon pro manĝi. Fakte la maljunulino post pasiĝo de eble horo metis la arde varmegan poton rekte inter la etenditajn krurojn, foriĝis kaj lasis min manĝi laŭ mia plaĉo. Mi faris tion, kaj volas konfesi, ke mi vere ĝuis la grandan lumbaĵon, kiun mi trovis dece, kaj fine ne rifuzis la brugaĵon, kvankam la pureco de la pota vere pridubindis kaj la manĝaĵo estis farita tute sen salo.

Dum trankvila konsidero mi devis diri al mi, ke oni ĝuigis min ege decan traktadon, kaj ankoraŭ hodiaŭ mi vetus cent po unu, ke la pota estis la sola en la tuta restejo.

Post finigita manĝado mi reelstreĉiĝis, metis kovrotukon sub mian kapon kaj dediĉiĝis al konsideradoj, kiuj longe tenis min maldorme. Tial mi rimarkis, ke ankaŭ mia ĉevalo estis manĝigata, kaj ke du gardistoj senĉese iradis ĉirkaŭ mia tendo. Pli poste la fajro finbruliĝis, kaj mi ekdormis. Estis la antaŭa vespero de gravaj okazoj; sed sendorme pasiĝinta nokto ne povis utili al ni. Do mi estis vekata de krakuma bruoj nur je la mateno, kaj kiam mi malfermis la okulon, mi revidis la maljunulinon, kiu estis bruliginta novan fajron kaj denove metinta la poton en la ardon.

Ŝi faris siajn devojn sen vidi al mi, kaj mi ne havis kaŭzon senti min ĉagrenita per tiu malatento. Mi manĝis mian viandon per la sama plezuro kiel je la pasinta vespero, kaj tiam decidis iomete promenadi antaŭ la dometo. Sed nur kiam mi estis metinta la kapon tra la truo, unu el la du gardistoj saltis al mi kun sia lanco, kvazaŭ li volis trapiki min de malsupre supren.

Tion mi nun nepre ne povis toleri, se mi ne volis subfosigi mian honoron unu fojon por ĉiam. Rapide decidinte mi do ekprenis la lancon per ambaŭ manoj proksime de ĝia pinto, puŝis ĝin for de mi, kaj tiam tiris ĝin tiel subite kaj forte reen, ke la ruĝa militisto ne plu kapablis ĝin teni. Li lasis ĝin kaj falis sur la teron je miaj piedoj.

„Uŝ!“ li vokegis, restariĝinte kaj ekprenante sian tranĉilon.

„Uŝ!“ mi ankaŭ diris, elzonigante mian tranĉilon kaj ĵetante la akiritan lancon en la tendon.

„La palvizaĝo redonu mian lancon!“

„La ruĝhaŭtulo iru kaj prenu sian lancon mem!“

Tio ŝajnis al la komanĉo nu ne vere farende, kiel mi povis konkludi per lia mieno, sed li estis ekhelpata, ĉar la alia gardisto venis ĉirkaŭ la tendo al mi.

„La blanka viro eniru!“ li krude ordonis al mi.

Ankaŭ li tenis la pinton de sia lanco tiel dense al mia vizaĝo, ke mi ne povis rezisti al la tento ripeti la sukcesintan provon. En la neksta momento li kuŝis tie, kie ankaŭ la alia estis kuŝinta, kaj lia lanco flugis en la tendon, kiel la antaŭa. Tio do nun estis troaĵo al tiuj du. Ili elpuŝis vokojn, kiuj movigis la tutan tendaranojn.

Vidalvide al mia tendo estis ĵus eminente pli granda loĝejo, antaŭ kies pordo tri ŝirmiloj estis pendigitaj de lancoj. Post la voko de la gardistoj la kurtenoj estis reenbatataj, kaj aperis malhela knabina kapo, pro elvidi pri la kaŭzo de la bruego. Du nigraj, ardaĵoj okuloj rigardis min mallongan tempon, tiam la kapeto remalaperis. Sed malmultajn sekundojn poste la kvar ĉefoj elpaŝis, renkonte al ni. Per postuleca mansigno de To-kaj-ĉun la gardistoj cedis reen.

„Kion faras la palvizaĝo tie ĉi antaŭ la tendo?“

„Kion mi faras tie ĉi? Mia ruĝa frato certe pli bone ĝuste volis demandi, kion faras tiuj du ruĝaj militistoj tie ĉi antaŭ mia *wigwam*!“

„Ili certigu, ke nenio malbona okazos al la palvizaĝo, kaj tial la palvizaĝo restu en sia dometo.“

„Ĉu To-kaj-ĉun havas tiel malicajn virojn inter siaj militistoj, aŭ ĉu lia ordono valoras tiel malgrave, ke li devas sekurigi sian gaston per gardistoj? Old Shatterhand ne bezonas gardiston, ĉar lia pugno terenbato ĉiun, kiu planas malicaĵon kaj elpensas mensogon. Miaj ruĝaj fratoj povas iri trankvile reen en iliajn *wigwam*-ojn. Mi iomete rigardos ilian vilago, kaj venos poste pro paroli kun ili.“

Post tio mi paŝis reen en la tendon pro kunpreni miajn pafilojn. Kiam mi tiam volis reeniri en la liberon, direktiĝis boneble pli ol dek lancoj al mi. Do mi estis kaptita. Ĉu mi defendiĝu aŭ ne?

Senvorte mi iris al la malantaŭa flanko de la tendo kaj tranĉis truon en la ledon per la ĉastranĉilo, tiel ke mi povis forlasi la ĉambron senĝene. Kiam mi nun aperis malantaŭe, dum ili gardadis antaŭe, mi unue ekvidis mirigitajn mienojn, kaj tiam eksonis kriado, kvazaŭ cent hundoj estis deŝiriĝintaj de iliaj ĉenoj. La ĉefoj estis reenirintaj en ilian tendon. Nun ili denove elpaŝis per hasto, kiuj malfacile ĝustis al ilia kutima digno. Ili urĝis tra la militistoj, kaj ŝajnis, kvazaŭ ili volis ekkapti min.

Defendiĝi per la armiloj ne eblis, ĉar mi estus pereinta, kaj la kamaradoj kune kun

mi. Do mi ŝiris mian teleskopon el la poŝo, disŝovis ĝin en du partojn kaj etendis ĝin al la ĉefo kun minacanta mieno.

„Haltu, aŭ ĉiuj filoj de la komanĉoj pereos!“

Ili fakte ekcedis reen, ĉar ili verŝajne ne jam konis tiun aĵon. Sed se ili jes antaŭe estis vidintaj teleskopon, ili ja ne povis scii, kiaj malbonigaj efikoj estis ligata al ĝia uzado.

„Kion la blanka viro volas fari?“ To-kaj-ĉun demandis. „Kial li ne restas en sia *wigwam*?“

„Old Shatterhand ĉiam faras, kio plaĉas al li. Li ne bezonas lasi sin fiksteni kontraŭ sia volo, ĉar li estas eminenta medicinisto inter la palvizaĝoj, kaj povas mortigi en kazo de urĝo ĉiujn animojn de la komanĉoj. Tion li pruvos al la ruĝaj viroj.“

Mi reenpoŝigis la teleskopon kaj ekprenis la Henry-pafilon.

„La ruĝaj viroj vidu al la paliso tie antaŭ la tendo!“

Dum tio mi montris al alta, dika paliso, kiu staris antaŭ unu el la malproksimaj tendoj. Tiam mi levis la pafilon kaj pafis. La paliso nun havis truon je ĝia pinto, kaj murmureto de respekto aŭdeblis. La ruĝulo aprecas kuraĝon kaj lertecon eĉ pri sia plej ega malamiko. Je la dua pafo la kuglo eniĝis du centimetrojn sub la unua. Je la sekvanta pafo la kuglo eniĝis samdistance sub la dua. Sed ne aŭdeblis aplaŭdo, ĉar la *indsmen*-oj estis troe mirigitaj. Ili ja certe jam aŭdis pri mia Henry-pafilo, kiu estis konata inter la ruĝuloj kiel magia armilo, sed samcerte ne estis kredinta al la multpafa miraklo. Je la kvara pafo la tuta amaso staris senomve. Je la sesa kaj sepa la miro eĉ pli grandiĝis. Tiam la miro anstataŭiĝis kun konsterno, kiu esprimiĝis en ĉiuj mienoj. Tiel mi elsendis dek kuglojn. Ĉiu eniĝis du centimetrojn sub la antaŭa. Tiam mi ĉesis. Kun trankvila mieno mi pendigis la pafilon al la ŝultro, kaj diris kviete:

„Ĉu la ruĝaj viroj nun vidas, ke Old Shatterhand estas eminenta medicinisto? Aĵn kiu volas fari malbonaĵon al li, devas ekmorti. *Hough!*“

Nun mi paŝis tra la amaso, sen ke unu riskis haltigu min. Je ambaŭ flankoj de la tendostratetoj staris la virinoj kaj knabinoj antaŭ la pordo kaj mire vidis al mi kvazaŭ al alispeca kreaĵo. Mi povis kontenti pri la impreso, kiun mia artpafado efikigis.

Antaŭ unu el la plej proksimaj tendoj mi ekvidis gardiston. En tiu tutcerte estis kaptito. Kiu estis tio? Mi ankoraŭ pripensis, ĉu mi demandu la postenulon aŭ ne, kiam mi ekaŭdis la sonon de bonkonata voĉo el la interno de la tendo.

„*Massa*, ho, ho eklasu povra Cäsar! *Indian* kaptis Cäsar e buĉos e manĵos Cäsar.“

Mi alpaŝis, malfermis la pordon kaj ellasis lin. La gardisto estis tiel malkuraĝita, ke li ne provis ĉesigi min, kaj ankaŭ neniu el la ruĝuloj, kiuj sekvis min, kontraŭis.

„Ĉu vi estis metinta en tien ĉi tuj kiam ni venis en la vilaĝon?“ mi demandis la nigrulon.

„Jes, *massa*. *Indian* prenis Cäsar de kavalo e duktis il en tendo. Ibe esis til nun.“

„Do vi tute ne scias, kie estas via *massa* Bernard, ĉu?“

„Pri *massa* Bern' nulo vidis, nulo aŭdis Cäsar!“

„Venu, kaj teniĝu proksime malantaŭ ni!“

Ni apenaŭ estis pluirintaj ĉirkaŭ kelkaj tendoj, kiam jam la kvar ĉefoj venis renkonte al ni kun altnombraj akompanantoj. La gardiĝaj homoj estis preterpasintaj nin mal-

antaŭ la tendoj, pro interrompi mian promenadon. Mi metis la manon al la tenilo de mia pafilo, sed To-kaj-ĉun jam defore signis al mi per mangesto, ke li ne havis malamikajn intencojn. Trankvile mi restis starante kaj atendis lin.

„Kien mia blanka frato volas iri? Li venu kun mi al la loko de la interkonsilado, kie la ĉefoj de la komanĉoj parolos kun li!“

Antaŭe mi estis estinta la ‚blanka viro‘ aŭ la ‚palvizaĝo‘, nun li nomas min lia ‚blanka frato‘. Do mi certe estis gajninta iom da respekto inter tiuj homoj.

„Ĉu miaj ruĝaj fratoj fumos la kalumeton kun Old Shatterhand?“

„Ili parolos kun li, kaj se liaj vortoj bonos, li estos same kiel militisto de la komanĉoj.“

Ni reeniris, preter mia tendo. Iom pli malproksime mi vidis la oldan Tony:n de Mark alligite, kaj flanke de ĝi la ĉevaloj de Winnetou kaj Bernard. Sed la tri kaptitoj ne troviĝis en la proksimo, alikaze mi estus rimarkinta iliajn gardistojn.

Fine ni venis al loko, kie la tendostrateto vastiĝis al preskaŭ cirkleronda placo, sur kies rando estis pluraj vicoj de indianoj. Tiu estis la loko de la interkonsilado.

La ĉefoj paŝis al ĝia mezo kaj tie sidiĝis. Kelkaj ruĝuloj, certe iel privilegiitoj, proksimiĝis kaj sidiĝis vidalvide al la ĉefoj en duoncirklon. Mi ne longe afektis, ankaŭ sidiĝis kaj faris mansignon al Cäsar sidiĝi malantaŭ mi. Sed tio ne plaĉis al la ĉefoj.

„Kial la blanka viro sidiĝas, kiam oni faros juĝadon pri li?“ To-kaj-ĉun demandis min kun faldigita frunto.

Mi faris malestiman geston.

„Kial sidiĝas la ruĝaj viroj, kiam Old Shatterhand faros juĝadon pri ili?“

Malgraŭ la senmoveco de iliaj mienoj mi vidis, ke tiu respondo miris ilin.

„La blanka viro havas ŝerceman langon, sed li restu sidante. Sed kial li liberigas la nigran viron kaj kunvenigas lin al la interkonsilado? Ĉu li ne scias, ke la negro neniam rajtas sidi, kiam la ruĝa viro ĉeestas?“

„La nigra viro estas mia servisto. Kiam mi ordonas al li sidiĝi, li sidiĝas, eĉ kiam ĉeestas cent ĉefoj. Mi pretas, oni komencu la interkonsiladon!“

Estis klare al mi, ke mi povis sekurigi min nur per tiu aŭdeca maniero. Ju pli krude mi kondutis, kompreneble certe sen ofendi la ruĝulojn, des pli granda estis la impresio, kiun mi faris al ili. Obeemo estus estinta mia certa perejo.

To-kaj-ĉun bruligis la kalumeton kaj fordonis lin. Al mi ĝi ne estis donata. Kiam tiu komenca ceremonio estis farita, li stariĝis kaj komencis sian paroladon. Al fremduloj la indianoj estas ege silentemaj. Sed kiam gravas, ili ekhavas parolemon, kiu tute ne estas suba al tiu de blankaj viroj dum kunveno. Inter ili estas ĉefoj, kiuj fordistance famas pro ilia parolada talento, kaj efikas ilian arton same kiel la eminentaj paroladantoj de la nova kaj malnova civilizita mondo. Ilia florecuma lingvo dum tio memorigas pri la esprima maniero de la orientaj popoloj. La ĉefo komencis per enkonduko, kiu ĉiam denove estas uzata kiam gravas paroli kontraŭ blankulo, fakte per akuzo kontraŭ la tuta raso de la palvizaĝoj:

„La blanka viro aŭskultu, ĉar To-kaj-ĉun, la ĉefo de la komanĉoj parolos! Nun jam multaj someroj pasiĝis, de kiam la ruĝaj viroj loĝis tute sole sur la tero inter la du grandaj akvoj. Ili konstruis urbojn, ili plantis maizon, ili ĉasis la bizonon. Al ili estis la sunbrilo

kaj la pluvo; al ili estis la riveroj kaj lagoj; al ili estis la arbaro, la montaro kaj ĉiuj savanoj de la vasta lando. Ili havis iliajn edzinojn kaj filinojn, iliaj fratoj kaj filoj feliĉis. Tiam venis la palvizaĝoj, kies koloro estis kiel la neĝo, sed kies koroj estas kiel la fulgo de la fumo. Ili nur estis malmultaj, kaj la ruĝaj viroj invitis ilin en iliajn *wigwam*:ojn. Sed ili kunalportis la pafilojn kaj la fajrakvon; ili alportis aliajn diojn kaj aliajn medicinistojn; ili kunalportis la perfidon, multajn malsanojn kaj la morton. Ĉiam pli da ili venis trans la granda akvo. Iliaj langoj estis mensogaj, kaj iliaj tranĉiloj akraj. La ruĝaj viroj kredis al ili kaj estis trompataj. Ili devis fordoni la landon, kie estis la tomboj de iliaj patroj. Ili estis pelitaj el iliaj *wigwam*:oj kaj ĉasejoj, kaj kiam ili defendiĝis, oni mortigis ilin. Pro venki ilin, la palvizaĝoj semis malpacon inter la tribojn de la ruĝaj viroj, kiuj nun devas ekmorti kiel la persekutata ĉasbesto sur la savano. Malbeno al la blankuloj! Malbeno al ili tiom, kiel steloj estas je la ĉielo kaj folioj sur la arboj de la arbaro!“

Laŭta aplaŭdo rekompenkis tiun paroladon de la ĉefo, kiu parolis tiel laŭte, ke li estis aŭdata klare ĉie ĉirkaŭe. Li pluis:

„Unu el tiuj palvizaĝoj venis en la *wigwam*:ojn de la komanĉoj. Tiu blankulo havas la koloron kaj la lingvon de la perfidistoj. Sed la ruĝaj militistoj aŭskultos liajn vortojn kaj juĝos juste pri li. Li parolu!“

To-kaj-ĉun residiĝis, kaj nun stariĝis la aliaj tri ĉefoj, unu post la alia. Ĉiu faris paroladon kun sama senco, kaj finiĝis per la postulo al mi paroli. Dum tiuj deklamadoj mi estis elpoŝiginta mian skizlibron kaj okupiĝis per desegni la ĉefojn, kiuj sidis antaŭ mi kun la malantaŭo de la militistoj kaj la tendoj.

Kiam la kvara parolado estis finiĝinta kun aplaŭdo, To-kaj-ĉun mansignis transe al mi.

„Kion faras la blanka viro, dum parolas la ĉefoj de la komanĉoj?“

Mi ŝiris la folion el la libro, leviĝis kaj donis ĝin al li.

„La granda ĉefo vidu mem, kion mi faras!“

„Uf!“ li vokis preskaŭ trolaŭte, kiam li ekvidis al la folio.

„Uf! Uf! Uf!“ eksonis tri fojojn plu, kiam la tri aliaj ĉefoj ekprenis la folion, kaj To-kaj-ĉun aligis:

„Tio estas ega medicino! La blanka viro sorĉas la animojn de la komanĉoj sur tiun blankan felon. Jen sidas To-kaj-ĉun, jen estas liaj tri fratoj, kaj tie staras iliaj militistoj kaj tendoj! Kion la palvizaĝo volas fari kun tio?“

„Tion la ruĝa viro tuj vidu!“

Mi prenis la folion el lia mano, kaj lasis ankaŭ la militistojn, kiuj sidis malantaŭ mi vidi al ĝi, kiuj same estis mirigitaj kiel la ĉefoj. Tiam mi kuncifis ĝin, rulis ĝin inter la manoj al bulo, kaj ŝovis ĝin en la tubon de mia Henry-pafilo.

„To-kaj-ĉun“, mi diris. „Vi mem deklaris, ke mi sorĉis viajn animojn sur tiun paperon. Nun ili estas en la tubo de mia pafilo. Ĉu mi elpafu ilin en la aeron, ke ili estas disŝirataj per la ventoj kaj neniam atingos la Ĉiamajn Ĉasejojn?“

La impresado de tiu petolaĵo estis pli efika ol mi estis ekspektinta. Ĉiuj kvar ĉefoj salte ekstaris, kaj ĉie ĉirkaŭe eksonis krioj de ektimo. Mi hastis trankviligi ilin.

La ruĝaj viroj sidiĝu, kaj fumu la kalumeton kun mi. Kiam ili estas miaj fratoj, mi redonos iliajn animojn al ili!“

Ili rapide sidiĝis, kaj To-kaj-ĉun ekprenis la pipon. Mi ekhavis spritan ideon, kiel mi eble povus obeemigi tiujn homojn eĉ pli. Unu el la tri ĉefoj havis kiel apartajn ornamaĵojn du monerece grandajn latunajn butonojn sur la buballeda ĉasĉemizo. Mi iris proksimen al li.

„Mia ruĝa frato prunte donu mallongan tempon tiujn ornamaĵojn al mi.“

Antaŭ li povis kontraŭi, mi estis detranĉintaj ambaŭ butonojn per la tranĉilo, kaj faris kelkajn paŝojn reen, sen zorgi pri lia konsterno.

„Miaj ruĝaj fratoj vidas tie ĉi tiujn butonojn inter miaj fingroj, unu en ĉiu mano. Ili atentu bone!“

Mi agis, kvazaŭ mi ĵetus la butonojn en la aeron, kaj tiam etendis la malplenajn manojn al ili.

„Miaj fratoj alvidu! Kie estas la butonoj?“

„For!“ ilia posedanto vokis per kreskanta kolero.

„Jes, ili forestas, alten al la suno. Mia ruĝa frato pafu ilin malsupren!“

„Tion kapablas neniu ruĝa kaj neniu blanka viro, eĉ ne medicinisto!“

„Do mi faros ĝin! Miaj ruĝaj fratoj bone atentu, kiam la butonoj venos malsupren!“

Mi ne prenis mian Henry-pafilon, ĉar en tiu ja estis la skizo, sed la ursmortigilon, kiu kuŝis flanke de To-kaj-ĉun, direktigis la tubon rekte alten kaj lanĉis. Kelkajn sekundojn poste io falegis flanke de ni sur la teron. La posedanto de la valora butono tien kuris kaj elterigis ĝin per la helpo de sia tranĉilo.

„Uf, estas ĝi!“

Dum ĉiuj rigardis mirante la aĵon, mi nerimarkate metis la duan butonon sur la buŝon de la dua tubo, kaj refoje direktigis la pafilon al la ĉielo. La pafo krakis, kaj ĉiu vidis supren. Tiam Ĉasar elpuŝis laŭtan krion, salte ekstarigis kaj frotis sian ŝultron, ĉirkaŭsaltante sur unu kruro.

„Ho, ha, *massa* atingas me, povra Ĉasar pafis sur ŝultro!“

La butono fakte estis falinta sur lian ŝultron, kaj nun kuŝis flanke de li sur la tero. La ĉefon ekprenis ĝin kaj enpoŝigis la du rericevintajn aĵojn kun mieno, per kiu videblis la klara decido ne permesi, ke ili estas ĵetantaj en la aeron duan fojon. Tiu eta iluziista petolaĵo faris egan impreson. Mi estis ĵetinta du butonojn al la suno, kaj redrepafis ilin. Ili vere estis tie supre, alikaze la unu el ili ne estus tiel profunde falinta en la teron, kaj la alia ne kaŭzinta tian eminentan ŝvelaĵon al la nigrulo, kiuj faris zorgigajn grimasojn per doloro. La ĉefoj sidis senmove sur la tero, videble nesciante kion ili devis fari, kaj ĉiu en ilia ĉirkaŭo atente atendis la aĵojn, kiuj nun okazu. Mi provis malaltigi la ŝtreĉumon, fakte per iomete aŭdeca maniero. Flanke de To-kaj-ĉun ankoraŭ kuŝis la pipo kune kun la didelfa sako, en kiu estis la tabako, laŭ indiana maniero miksitaj kun kanabfolioj. Mi ekprenis la kalumeton, ŝtopis ĝin, tenigis en mia plej fiera pozo, kaj komencis:

Miaj ruĝaj fratoj kredas al Granda Spirito, kaj ili pravas, ĉar ilia Manitou estas ankaŭ mia Manitou. Li estas la estro de la ĉielo kaj de la tero, la patro de ĉiuj popoloj kaj volas, ke ĉiu homo vivu flanke de la alia en paco kaj harmonio. La ruĝaj viroj estas kiel la herboj inter tiuj tendoj. Sed la palvizaĝoj havas nombron de ĉiuj tigoj de la prerioj

kaj savanoj. Ili transvenis trans la granda akvo kaj forpelis la ruĝajn virojn el iliaj ĉas-ejoj. Tio estis malbona ago de ili. Sed kial nun la ruĝaj viroj estas malamikecaj al ĉiuj palvizaĝoj? Ĉu la ruĝaj viroj ne scias, ke estas tre multaj triboj de palvizaĝoj en la mondo, kaj ke estas nur kelkaj el ili, kiuj forpelis la ruĝajn militistojn? Ĉu la komanĉoj volas esti maljuste kaj malami la senkulpulojn kune kun la kulpulojn? Old Shatterhand apartenas al la forta kaj saĝa tribo de la *German*. Ĉu tiu tribo iam faris suferigon al la ruĝaj viroj? Miaj ruĝaj fratoj vidu al Old Shatterhand, kiu staras antaŭ ili! Ĉu ili vidas je lia zono la skalpon de ruĝa viro? Ĉu ili vidas je lia *leggings* aŭ *mokassin*-oj la harojn de unu el iliaj fratoj? Kiu povas diri, ke li makulis sian manon per la sango de la ruĝaj viroj? Li kuŝis en la arbaro, kiam la militistoj de la komanĉoj fumis la kalumeton kun liaj du malamikoj, sed eĉ ne gratis la haŭton de unu el ili. Li kaptis Ma-ram:on, la filon de la eminenta ĉefo To-kaj-ĉun. Sed li ne mortigis lin, sed redonis lian pafilon al li, kaj kondukis lin al la *wigwam* de lia patro. Ĉu li ne povis mortigi ses militistojn de la rakuroj, sed ne faris ion al ili, nur fiksligis unu, proke li estu trovata kaj malkatenata de liaj fratoj? Ĉu li ne pafis al la palvizaĝoj, kiuj murdis la gardiston de la komanĉoj kaj tiam fuĝis kun la oro? Ĉu li ne havas la animojn de la komanĉoj en sia tubo, sed tamen ne volas pereigi ilin? Ĉu li ne povas ĵeti ĉiujn medicinaĵojn de la rakuroj al la suno, sen ke li redepafas ilin? Li povas, sed li ne faras tion, sed plie deziras esti la frato de la komanĉoj kaj fumi la kalumeton kun ili. La ĉefoj de la komanĉoj estas bravaj, saĝaj kaj justaj. Kiu ne kredas tion, tiun mortigos Old Shatterhand per la tubo, el kiu venas sennombraj kugloj, kaj tial li nun trinkos kun ili la fumon de la paco!“

Mi bruligis la tabakon, faris du ensuĉojn, blovis la fumon al la ĉielo, al la tero kaj al la kvar ĉielaj direktoj, kaj tiam donis la pipon al To-kaj-ĉun. Mi fakte sukcesis persvadi lin. Li prenis la kalumeton, same faras siajn ses ensuĉojn kaj tiam pludonis ĝin. La lasta ĉefo donis ĝin al mi, kaj nur nun mi sidiĝis, meze inter la ruĝuloj.

„Ĉu mia blanka frato nun redonos niajn animojn al ni?“ unu el la ĉefoj zorge demandis.

Mi devis respondi tre gardiĝe.

„Ĉu mi nun estas inter la ruĝaj viroj kiel militisto de la komanĉoj?“ estis mia redemandado.

„Old Shatterhand estas nia frato. Li liberas. Li ricevos tendon kaj povos fari, kion li volas.“

„Kiun tendon mi ricevos?“

„Old Shatterhand estas eminenta militisto. Li ricevos la tendon, kiun li elektos.“

„Do miaj ruĝaj fratoj venu kun mi, proke mi povas elekti!“

Ili ekstaris pro sekvi min. Mi iris laŭ la tendostrateto, ĝis mi rimarkis tendon, antaŭ kiuj gardis kvar viroj. Tuj mi sciis, kion mi devis pensi, kaj faris salton al la pordo.

„Ĉi tiu estas la loĝejo de Old Shatterhand!“

La ĉefoj vidis mirigite unu al la alia, ĉar tiun facile elpenseblan kazon ili ne antaŭsentis.

„Tiun tendon mia blanka frato ne povas ricevi.“

„Kial ne?“

„Ĝi estas por la malamikoj de la komanĉoj.“

„Kiuj estas tiuj malamikoj?“

„Du palvizaĝoj kaj ruĝa viro.“

„Kiuj estas la nomoj de tiuj viroj?“

„La ruĝa viro estas Winnetou, la ĉefo de la apaĉoj, kaj unu el la blankuloj estas Sans-ear, la indianmortigisto.“

„Old Shatterhand volas vidi tiujn homojn!“

Kun tiuj vortoj mi eniris. La ĉefoj tuj sekvis.

La kaptitoj kuŝis, fiksligite je manoj kaj piedoj sur la tero, kaj estis krome ligitaj al la tendopalisoj. Neniu el ili diris vorton, neniu malkaŝis per mieno la ĝojan senton, kiun mia ĉeesto certe kaŭzis al ili.

„Kion faris tiuj viroj?“ mi demandis.

„Ili mortigis la militistojn de la komanĉoj.“

„Ĉu mia ruĝa frato vidis tion?“

„La militistoj de la rakuroj scias tion.“

„La militistoj de la rakuroj devos pruvi tion. Tiu tendo estas mia, kaj tiuj tri viroj estas miaj gastoj!“

Mi elzonigis la tranĉilon pro distranĉi la katenojn de la kaptitoj. Unu el la ĉefoj ekprenis mian brakon.

„Tiuj viroj ekmortu. Mia blanka frato ne povas estigi ilin siajn gastojn!“

„Kiu povus malpermesi tion al mi?“

„La kvar ĉefoj de la rakuroj.“

„Ili nur risku tion!“

Kun tio mi stariĝis meze inter ili kaj la kaptitoj. Krom ili nur Cäsar estis envenintaj.

„Cäsar, distranĉu la katenojn. Unue tiuj de Winnetou!“

La negro jam estis irinta al sia mastro, sed li obeis al mia ordono, ĉar ankaŭ li devis kompreni, ke Winnetou povis esti pli utila al mi ol Bernard.

„La nigra viro enzonigu sian tranĉilon!“ la ĉefo ordonis, sed Winnetou jam estis liberigita de siaj katenoj.

„Uf!“ la komanĉo vokis, kiam li vidis, ke sia ordono ne estis obeita, kaj volis salti al Cäsar, kiu intertempe estis hastinta al Mark pro liberigi lin.

Mi paŝis renkonte al la ruĝulo. Li ekprenis la tranĉilon kontraŭ mi kaj puŝis ĝin, ĉar mi rapide estis deturniĝinta, en mian supran brakon. Mi ne havis tempon eltiri la tranĉilon. Pugnobato de mi terenigis lin. Dua trafis sian flankulon per la sama forto. Tiam mi ekprenis la trian je la kolo, dum Winnetou malgraŭ siaj ŝveliĝintaj manartikoj jam estis metintaj siajn fingrojn ĉirkaŭ la kolo de To-kaj-ĉun.

Nur tiu sola „Uf!“ estis soninta. Ekstere staris la gardistoj, kaj tamen ni estis mastroj de la tendo post du minutoj, kaj la ĉefoj kuŝis fiksligitaj kaj buŝstopitaj sur la tero.

„Heavens, tio vere estis helpo en la mizero!“ Mark konfesis, frotante siajn ridiĝintaj membrojn. „Charley, kion vi ekzemple sukcesis tion?“

„Mi rakontos tion poste. Antaŭ ĉio nun armigu! Tiuj kvar viroj kunhavas sufiĉe da armiloj!“

Ankaŭ mi malfermis, pro preti pri ĉiuj okazoj, la patronpoŝon, kiuj pendis de mia zono kaj reŝargis miajn pafilojn. Dum tiu mallonga tempo mi donis kelkajn konduatajn ordonojn, kiuj rezultis, ke ni tuj mortigu la kvar ĉefojn, se oni volis fari atakon kontraŭ ni. Tiam mi paŝis el la tendo. La gardistoj estis reencedintaj per respekto antaŭ la ĉefoj, kaj ankoraŭ staris multaj komanĉoj, kiuj estis sekvintaj nin kaj atente spektis la okazigojn de la aventuro. Mi unue iris al la gardistoj.

„Miaj fratoj aŭdis, ke Old Shatterhand estiĝis amiko kaj frato de la komanĉoj, ĉu?“  
Mallevo de la palpebroj signifis jesan respondon.

„La ruĝaj militistoj bone gardu la tendon kaj lasu neniun eniri, ĝis la ĉefoj ordonos ion alia!“

Nun mi paŝis al la aliaj militistoj.

„Miaj fratoj iru kaj voku ĉiujn militistojn al la loko de la interkonsilado!“

Ili disiris, kaj mi paŝis sole al la preparolita loko. Kiu ne konas la kutimojn de la ruĝuloj pensos, ke mia konduto estis furioza aŭdecaĵo. Sed malprave. La indiano tute ne estas la ‚sovaĝulo‘, kiel li plej ofte estas priskribata. Li havas siajn neŝanĝeblajn leĝojn kaj kutimojn. Kiu povas utiligi ilin, ne endanĝerigas. Cetere tio ĉi ja koncernis pri vivo aŭ morto, kaj per riskaĵo mi ne povis riski pli ol la vivo.

Survoje mi sukcesis forviŝi la spurojn de la negrava piko. Tiam mi sidiĝis tie, kie mi antaŭe estis sidinta. Post dek minutoj la tuta placo estis plenigata de militistoj. En la mezo restis libera spaco, kie tiuj privilegitoj sidiĝis, kiuj jam antaŭe estis ĉeestintaj. Je aliaj lokoj kunveno neniam okazigas senbrue, sed tie ĉi inter la tiel nomataj sovaĝuloj neniu vorto estis parolata. Ĉiu venis serioze kaj silente, kaj tiam staris senmove kiel kolono, pro atendi la nekstaĵojn.

Mi mansignis al la menciitaj privilegitoj veni al mi. Ili sidiĝis en duoncirklo antaŭ mi kaj mi komencis:

„Old Shatterhand estiĝis amiko kaj frato de la komanĉoj. Ĉu miaj fratoj aŭdis tion?“

„Ni scias tion“, respondis unu por ĉiuj.

„Li elektu loĝejon, kaj li elektis la tendon de la kaptitoj. Ĉu tiu nun estis lia posedaĵo?“

„Ĝi estis lia.“

„Sed tamen oni rifuzis ĝin al li. Ĉu la ĉefoj de la komanĉoj estas mensogistoj? La kaptitoj kiel loĝantoj de tiu tendo estis sub la savo de Old Shatterhand. Ĉu li rajtis doni tiun savon al ili?“

„Jes.“

„Bone. Li agis tiel, kaj diris, ke tiuj viroj estas liaj gastoj. Ĉu li rajtis fari tion?“

„Old Shatterhand havis la rajton kaj la devon pri tio. Sed li ne rajtas reteni ilin de la juĝado. Li nur rajtas gardi ilin kaj laŭcirconstance ekmorti kun ili.“

„Kaj ĉu li rajtas forigi iliajn katenojn, kiam li garantias pri ili?“

„Li rajtas.“

„Do Old Shatterhand nur faris, je kiu li havis rajton. Tamen oni volis mortigi lin. La tranĉilo nur trafis lian brakon. Kion faras komanĉo, kiam alia volas mortigi lin en lian propran tendon?“

„Li rajtas neigi lian vivon.“

„Kaj neigi ĉiujn, kiuj volas helpi al la murdisto, ĉu?“

„Ĉiujn!“

„Miaj fratoj estas saĝaj kaj justaj. La kvar ĉefoj de la rakuroj volis murdi min. Sed mi ne mortigis ilin, sed mia mano batis ilin teren. Ili kuŝas katenite en mia tendo kaj estas gardataj de miaj gastoj. Mi postulas la liberecon de miaj gastoj pro la libereco de miaj murdistoj! Miaj fratoj interkonsilu kaj mi atentos. Sed ili ne maltrankviligu miajn gastojn, ĉar tiuj viroj mortigos la ĉefojn, se iu alia kiel Old Shatterhand ekvenas en la tendon!“

Neniu trajto de iliaj vizaĝoj malkaŝis la egan impreson, kiun tiu parolado certe faris al la ruĝuloj. Mi forcedis tiel reen, ke mi ne povis aŭdi iliajn vortojn. Ili faris, kiel mi estis pensinte, tiel nomeblan subinterkonsiladon, sub la rango de la ĉefoj. Per iliaj man-signoj venis kelkaj viroj de ĉiu flanko de la placo, kiujn ili ŝajne informis pri la aktualan staton, proke ili povis pluciigi al la aliaj. Tiu rimedo kaŭzis kelkan moviĝon en la kunveno, sed sen ke ia molesto okazis al mi. Tiam oni longe interkonsiladis, ĝis tri el ili stariĝis kaj paŝis al mi. Unu komencis paroli:

„Nia blanka frato tenas la ĉefojn de la komanĉoj kiel kaptitoj en lia tendo, ĉu?“

„Tiel ĝi estas.“

„Li eldonos ilin al la komanĉoj, proke tiuj povas juĝadi pri ili.“

„Miaj fratoj forgesas, ke militistoj neniam povas juĝadi pri iliaj ĉefo, nur kiam li mal-kuraĝas dum batalo. La ĉefoj volis mortigi Old Shatterhand:on. Ili estas en lia *wigwam*, kaj nur li sole povas puni ilin.“

„Kaj kion li faros kun ili?“

„Old Shatterhand mortigos ilin, se li ne ricevas la liberecon de siaj gastoj.“

„Ĉu li konas tiujn gastojn?“

„Jes.“

„Unu el ili estas Sans-ear, la indianmortigisto.“

„Ĉu miaj fratoj vidis, ke li mortigis komanĉon?“

„Ne. Sed anstataŭ alia el ili estas Winnetou, la pimo, kiuj mortigis centojn da komanĉoj!“

„Sed nur en la valo de la Mapimi, post li vane estis ofertinta al ili pacon kaj amikecon tri fojojn. Kaj inter ili estis tute neniu militisto de la tribo de la rakuroj.“

Tion ili ne povis malkonfesi, kaj tiel la parolanto de la ruĝuloj fine faris demandon pri Bernard Marshal.

„Kiu estas la tria?“

„Viro el la nordo, kiu neniam antaŭe batalis kontraŭ indiano.“

„Se nia frato mortigos la ĉefojn, li ja ankaŭ estos mortbatotaj kune kun siaj gastoj.“

„Miaj fratoj ŝercas. Kiu volas mortigi Old Shatterhand:on? Ĉu li ne havas la animojn de la komanĉoj en la tubo de sia pafilo?“

La komanĉoj estis en embaraso kaj pripensis. Ili neeble povis rezigni pri iliaj ĉefoj.

„Mia frato atendu ĝis ni revenos!“

Ili foriĝis kaj la interkonsilado rekomencis. Ajn kien mi povis vidi, neniu vizaĝo malkaŝis nuancon de malamo aŭ kolero pri mi. Mi kondukis brave kaj fidis pri ili. Do

ne estis malhonoro al ili intertrakti kun mi. Post preskaŭ duona horo la tri elsenditoj revenis al mi.

„Old Shatterhand havu sian liberecon kaj tiun de siaj gastoj, sed nur dum kvarona parto de la tago!“

Ha! Do ili celis al la tradicia indiana amuzo liberigi iliajn kaptitojn, pro tiam povi fari ekscitigan ĉason, kaj certigis per tio la avantaĝon tiri iliajn ĉefojn el la danĝero. Ili donis al ni antaŭecon de ses horoj. Tio malmultis. Sed se ni ekirus ĵus ses horojn antaŭ la vespero, tiu templimo plilongiĝis dum la tuta nokto, dum kiu ili ne povis sekvi nin. Mi estus estinta frenezulo, se mi ne tuj estis akceptinta; tio nur devis okazi per la necesa retenigo.

„Old Shatterhand jesas, kiam iliaj gastoj ricevas la armilojn, kiujn oni deprenis de ili.“

„Ili ricevos ilin.“

„Ankaŭ ĉion alian, kiujn ili posedis, ĉu?“

Per tio mi celis aparte al la valoraĵoj, kiujn Bernard estis kunhavinta, kaj pri kiuj mi ne sciis, ĉu oni deprenas ilin de li.

„Ĉion!“

„Miaj blankaj gastoj estis kaptitaj, kvankam ili ne faris malbonaĵon al la komanĉoj. La ĉefoj sed estu liberigataj, kvankam ili volis murdi min. La interŝanĝo do ne samvaloras.“

„Kion mia frato postulas plu?“

„La piko en la brakon kostu al la ĉefoj tri ĉevalojn, kiujn mi elektos el iliaj bestoj. Pro tio mi donos al ili tri el niaj.“

„Mia frato estas ruza kiel la vulpo. Li scias, ke liaj ĉevaloj estas elĉerpitaj. Sed li havu, kion li deziras. Kiam li lasos la ĉefojn iri el lia *wigwam*?“

„Kiam li forrajdos de liaj ruĝaj fratoj.“

„Kaj li liberigos la animojn el la tubo de sia pafilo, ĉu?“

„Li ne pafos ilin en la ventojn.“

„Tiukaze li ekiru, ajn kien li volas. Li estas eminenta militisto kaj ruza vulpo. La sensoj de la ĉefoj de la komanĉoj estis estintaj malheligitaj, ke ili fumis kun li la kalumeton de la paco. *Howgh!*“

La negocado estis farita, kaj mi povis iri. La ĉirkaŭstarantoj lasis min trapasi senĝene, kaj malrapide, sen hasti, mi paŝis al mia *wigwam*. Tie mi estis atendata per granda tensio, kaj kiam mi eniris sole, tio estis signo al la kunuloj, ke la afero povis okaziĝinta ne tre malbone.

„Ĉu nu?“ Bernard demandis, kiun la scivolon urĝigis.

„Ĉu oni deprenis Viajn diamantojn aŭ paperojn?“

„Ne. Kial?“

„Ĉar Vi alikaze estus devinta ricevi ilin. Ni estas liberaj dum ses horoj!“

„Ka libera, *massa*?“ Ĉasar vokis. „Ho, ha, libera es Ĉasar e *massa* Bern! Ma nur sis hori, tande rekaptos *indian* massa Bern' e Ĉasar!“

„*Welt*“, diris Mark, „tio estas ĉio, kion ni povas deziri. Tiu estis tute diableca mizero, en kiun ni ĉi tie ekzemple eniĝis! Sed diru, kiel fartas la Tony?“

„Vi ricevos ĝin, kune kun ĉio, kion vi posedas. Ankaŭ Winnetou ricevos sian ĉevalon. Sed la aliaj bestoj estas tro elĉerpitaj, kaj kvankam mi ne ŝate fordonas mian mustangon, mi tamen kondiĉis rajti elekti tri el la ĉevaloj de la ĉefoj.“

„*Heigh-day*, Charley!“ Mark ridis. „Ses horojn antaŭeco kaj kvin bonajn ĉevalojn, tio sufiĉas al homoj kiel ni. Ĉar ke vi ne elektos kaprojn, tion mi certe volas ekspekti!“

Nun ne plu eblis alimaniere, mi devis almenaŭ koncize rakonti ĉion al miaj kunuloj, kion mi travivis ekde nia perforta disiĝo. Mi ne jam estis finiĝinta, kiam ekstere eksonis voko. Mi elpaŝis kaj vidis la maljunulinon, el kies poto mi estis manĝinta du fojojn.

„La palvizago venu!“

„Kien?“

„Al Ma-ram.“

Tio estis stranga mesaĝo. Mi unue sciigis miajn kunulojn kaj tiam sekvis ŝin. Ŝi kondukis min al la tendo, kiu staris vidalvide al mia hieraŭa loĝejo. Antaŭ tiu staris du ĉevaloj, sur unu sidis Ma-ram.

„Mia blanka frato elektu siajn ĉevalojn!“

Do estis tio! Mi surĉevaliĝis, kaj ni rapide rajdis laŭ la strato kaj eksteren sur la prerion, kie ni trovis altan nombron da ĉevaloj, kies kruroj estis alligitaj. La juna indiano kondukis min rekte al nigra virĉevalo.

„La plej bona ĉevalo de la komanĉoj! Ma-ram ricevis ĝin de sia patro. Li donacas ĝin al Old Shatterhand pro la skalpo, kiun li lasis al li.“

Mi estis surprizigita pri la riĉa, grandanima donaco, ĉar sur tia ĉevalo mi ne povis esti atinginta. Mi akceptis ĝoje kaj elektis du bestojn por Bernard kaj Cäsar, pri kiuj ili povis kontenti.

Nun ni rajdis reen. Ma-ram haltis antaŭ sia tendo.

„Mia blanka frato deĉevaliĝu kaj envenu!“

Mi ne povis malakcepti tiun inviton. Mi estis kondukata en la internon de la tendo, kaj ricevis pecon da *kammas*-kako pro gustumi. Tiam mi adiaŭis. Kiam mi paŝis el la dometo, mi vidis la malhelokulan knabinon okupiĝanta ĉe la ĉevaloj, kiun mi estis rimarkinta jam je la mateno. Ŝi plenigis la selpoŝojn de la bestoj, kiuj jam surhavis niajn selojn, per manĝaĵprovizojn.

„Kiu estas la filino de la rakuroj?“ mi demandis Ma-ram:on.

„Estas Hi-la-di, la filino de la ĉefo To-kaj-ĉun. Ŝi petas vin preni, kion ŝi ofertas al vi, ĉar vi indulgis pri ŝia frato Ma-ram.“

Mi ofertis mian manon al la knabino.

„Manitou donu al vi feliĉon kaj multajn somerojn, vi floro de la savano! Via okulo estas kaj via frunto puras. Ankaŭ via vivo restu tiel lume kaj senmakule!“

Tiam mi sursvingiĝis kaj irigis miajn tri ĉevalojn al la amikoj. Ili ĉiuj, kaj speciale Mark ekraŭigis per la vido al mia nigra virĉevalo.

„Charley“, li diris, „tiu estas preskaŭ tiel valora kiel mia Tony, nur ke ĝi havas pli mallongan voston kaj pli longajn orelojn. Cetere nun ĉio ĉeestas, ĉar tiuj ruĝaj uloj portis ĉion al ni, kio mankis al ni. Nun estas ĵus horoj antaŭ vespero. Ni ekrajdu, kaj tiam ekzemple vidu, ĉu ili kaptos nin refoje!“

„*Massa*, nun for“, Cäsar admonis, „tre multe rapide for, ke ne venas *indian* e rekaptas omna tute *massa* Bern’, Mark, Old Shatterhand e Winnetou!“

La ĉefoj ne moviĝis, tiel longe kiel ni ankoraŭ troviĝis en la tendo. Ni surĉevaliĝis, kaj ekrajdis. La tendostrateto malplenis. Neniu indiano videblis. Sed tutcerte nia ekiro estis rigardata de ĉiuj. Nur ĉe la tendo de To-kaj-ĉun estis al mi, kvazaŭ kvar okuloj videtis tra la fendo de la kovrilo. Cent koroj bategis per la espero atingi nin. Sed tie ĉi certe estis du, kiuj deziris, ke ni sukcesis fuĝi.